




Festivala Kuriero

11-a de septembro 2020, numero 17

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2020

 Miguel Gutiérrez Adúriz
Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA



Partoprenis 151 verkoj el Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

BRANĈO POEZIO

Juĝkomisiono: Krys Williams, Ĵak Le Puil, István Ertl.
Partoprenis 56 verkoj de 31 aŭtoroj el 19 landoj [5 el Afriko, 13 el Ameriko, 9 el Azio, 29 el Eŭropo]

Unua premio: "Mia kvaropo admirinda" de Nicolino Rossi, el Italio.

Dua premio: "Ek sor" Evgenij Georgiev, el Kazaĥio.

Tria premio: en egaleco por jenaj tri verkoj:
"La renkonto kun la trompo" de Tiberio Madonna, el Italio.

"Pri-kronviroza kroniko..." de Serĝo Sir', el Francio.

"La nigra dio" de Jesper Lykke Jacobsen, el Francio.

BRANĈO PROZO

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele

Partoprenis 27 verkoj de 18 aŭtoroj el 16 landoj [2 el Azio, 1 el Afriko, 4 el Ameriko, 20 el Eŭropo].

Unua premio: "Finjo" de Vladimir Opletajev, el Rusio.

Dua premio: "Muŝribelo" de Ewa Grochowska, el Francio.

Tria premio: "Nova Dekameron" de Paulo Sérgio Viana el Brazilo.

SUBBRANĈO MIKRONOVELO

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele.

Partoprenis 50 verkoj de 24 aŭtoroj el 13 landoj [11 el Ameriko, 10 el Azio, 29 el Eŭropo].

Unua premio – Premio Paula Adúriz: "La stranga butikumo" de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

BRANĈO TEATRAĴO

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Serĝo Sir', Saša Pilipović

Partoprenis 1 verkoj de 1 aŭtoroj el 1 landoj.

Neniu premio estis aljuĝita.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Serĝo Sir', Saša Pilipović

Partoprenis 6 verkoj de 5 aŭtoroj el 4 landoj.

Unua premio – Premio María Cuevas: "Ne tute, nur duone" de Tiberio Madonna el Italio.

BRANĈO ESEO

Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.

Partoprenis 10 verkoj de 10 aŭtoroj el 9 landoj [6 el Eŭropo, 2 el Azio, 1 el Afriko]

La unua premio – Premio Luigi Minnaja: ne aljuĝita.

Dua premio: "Komparo inter Esperanto kaj Okcidentalo" de Emanuele Bovio-Regano el Italio.

Tria premio: ne aljuĝita.

Gajnis honoran mencion la verkoj:

"Halka kantas esperante" de Roman Dobrzyński el Pollando.

"De hilelismo al Homaranismo: Ĉu nova hipotezo?" de Roberto Lloancy el Francio.

INFANLIBRO DE LA JARO

Juĝkomisiono: Ricardo Albert Reyna, Jang Jeong-Ryeol.

Partoprenis 1 infanlibro de 1 eldonejo el 1 lando.

La premio estas aljuĝita al la Eldonejo Esperanto-Asocio de Britio pro la verko "La krubalo" de Julia Donaldson kaj Axel Scheffler.

AMO (Aktivula Maturigo) 67 – aperis la provizora programo (laŭ la informoj el EKO 2020-45)

Temo: Varbado de junuloj

Dato: 13-a de septembro (dimanĉo).

Tempo-sistemo: Centr-Eŭropa Somera Tempo (CEST). Tio estas UTC +2.

15:00 – Malfermo: Enkonduko Stefan MacGill (pretigos lumbildojn).

15:15 – Prezento de TEJO: Moderna teknologio en la altiro de junuloj.

15:45 – La rolo de regionaj asocioj ekzemple de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado

– Małgosia Komarnicka.

16:15 – Prezento de TEJO: La Eŭropa situacio:

– konsilioj kaj gvido en la varbado de junuloj;

– strategio por fortigi kaj restarigi Eŭropajn sekciojn.

16:45 – La ĵurnalista asocio TEĴA – Alfred Schubert.

17:15 – Forumo kaj diskuto. Malferma al ĉiu. Panelistoj bezonataj!

18:00 – Provo kompili/akcepti liston de rekomendoj.

[Gazetara Komunikado N-ro 904]

Lasta ŝanco aliĝi kaj spekti la unuan Virtualan Kongreson de Esperanto: ĝis la 20-a de septembro

Se vi ne jam spertis la Virtualan Kongreson de Esperanto (VK) aŭ ŝatus (re)spekti programerojn, jen la lasta ŝanco: por ebligi al ĉiuj partopreni tiun unikan virtualan festenon de Esperanto, UEA plilongigis la unikan VK-sperton ĝis la fino de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020), la 20-an de septembro. Tiu invito validas por ĉiuj, ankaŭ tiuj kiuj ankoraŭ ne estas membroj de UEA. VK-aliĝintoj povas normale aliri la virtualan kongresejon per vk.retevent.com. Novaj aliĝantoj bv. uzi la retan aliĝilon: vk.mondafest.net. La aliĝkoto estas simbolaj por individuaj membroj de UEA kaj varias laŭ lando: 20, 10 kaj 5 EUR por landkategorioj 5, 4 kaj 3, respektive, kaj nulo por landkategorioj 1 kaj 2 laŭ la koto-sistemo de UEA. Per la sama aliĝilo eblas aliĝi ne nur al la VK, sed

ankaŭ al UEA. Ĉiuj bonvenas subteni la laboron de la Asocio per aliĝo. Se iu havas problemon pagi la aliĝkoton, bv. skribi al la adreso mondafest2020@googlegroups.com.

La speciala platformo de la VK ebligas al la partoprenantoj inteligente serĉi apartajn programerojn per nomo, prezentanto, kategorio. Entute disponeblas 140 spektakloj. Esploru: vk.retevent.com/programo. Enirante programeron, vi spertos ĝin same kiel ĝi okazis dum la realtempa kongreso, vi povos vidi la lastatempajn komentojn kaj mem afiŝi novajn en la babilejo. Daŭre funkcias la “konstantaj” vidbabilejoj “Koridoro”, “Kafejo” kaj “Librejo” por renkontiĝo de kongresanoj.

Jam aliĝis 1863 personoj el 95 landoj: vk.mondafest.net/aliĝintoj. Ili ĝuis plej varian programon, inkluzive de ne nur tradiciaj UK-programeroj, sed ankaŭ novspecaj spertoj: centoj da virtualaj ĉambroj “vidbabilejoj”, kie okazis liberaj kunvenoj, pli ol 20 prezentoj de aŭtoroj kaj eldonejoj dum Aŭtoraj Momentoj kaj Libro de la Jaro, ok virtualaj ekskursoj al diversaj mondpartoj, sep virtualaj koncertoj de konataj E-muzikistoj, 11 sciencaj prelegoj kadre de la Internacia Kongresa Universitato kaj la Scienca Kafejo, plurnivelaj Esperanto-kursoj, kunmanĝado tra la mondo, aŭkcio kaj multaj pli. Bunta ĉiutaga raportado dum la VK estas daŭre videbla en la Festivala Kuriero. Vi bonvenas aboni ĉe mondafest.net/kuriero.

Plej bone esprimas nian laboron spite de la pandemio la vortoj de Humphrey Tonkin, honora prezidanto de UEA: “La Universala Kongreso de Esperanto ne okazas... Sed okazis io alia – iu mirakla transformiĝo. La esperantistoj kunvenas en senprecedencaj nombroj perrete. Al la ĵusa Virtuala Kongreso de Esperanto aliĝis duobla nombro de kongresanoj kompare kun la nombro kiun oni atendis en Montrealo antaŭ la nuligo de la Universala Kongreso. Miloj da homoj ligiĝas virtuale trans la landoj kaj kontinentaj limoj.”

Via aliĝo helpas al UEA konstrui la venontajn Virtualajn aŭ Hibridajn Kongresojn, tamen restas nur du semajnoj por sperti la unuan. Aliĝu ankaŭ vi, bonvenon (re)sperti la VK-on!

La informa reto pri Esperanto

La konstruado de la informa reto pri Esperanto daŭras sub la gvido de la estrarano pri informado de UEA. Bonvolu instigi la homojn, kiuj respondecas pri informado en via loka grupo aŭ landa asocio, aliĝi al ĝi per la retejo: <https://groups.io/g/informa-reto-pri-esperanto>.



La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj



Nepre spektu la prezenton de la premiitoj en la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu ĉi-jare okazas kadre de #MondaFest2020: sabaton, la 12-an de septembro, je la 14:00 UTC (16:00 CEST) ĉe <http://ecem.com.pl>. La eventon organizas la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, sub gvido de Małgorzata "Małgosia" J. Komarnicka kaj aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, ILEI, Eurokka kaj aliaj grupoj.

Speciala oferto!

En septembro legu *septembre!* Aĉetu *Septembre, surstrate en Tokio* dum la tuta monato kun sesona rabato, sendepende de kvanto.

Septembre, surstrate en Tokio

Granda Tertremo en la regiono Kantō 1923 - Postsono de Masakro

Aŭtoro: Naoki Katō

205 paĝoj, 21 cm
Prezo ĉe UEA: 11,75 €



Beletra rubriko

La bruo el l' atiko

originale verkita en Esperanto

(Daŭrigo. La unuan kaj duan partojn legu en la antaŭaj numeroj de la *Kongresa Kuriero*)

■ Jose Carrillo (Ĵosefo, Kanado)

Estis nokto. Ni povis denove aŭdi la bruon de la vesperto. Mia edzino petis min: "Iru al l' atiko kaj timigu la vesperton!"

Mi respondis: "Sed mia kara, la plagokontrolisto venos morgaŭ!"

Ŝi denove diras al mi: "Iru!"

Mi iris al l' atiko. Komence, mi vidis nenion.



Poste mi vidis ion, kio timigis min! Ion kio multe timigis min!

Ĉirkaŭita de fumo, Kajla staris ĉe l' atiko, kaj ŝi diris: "Saluton, Paĉjo!"

Mi ekkriegis! "Ho, mia kara! Ni ne havas vespertojn ĉe l' atiko. Ni havas vampirojn! Kaj Kajla estas vampirino!"

Kajla diris per kaverna voĉo: "Paĉjo, ĉu vi memoras mian sonĝon? Mi flugis per flugiloj. Jes, mi ja estas vampirino! Kaj mi estas tiu, kiu faras la bruon en l' atiko!"

Ŝi daŭrigis: "Mi ankaŭ sonĝis, ke iu sekvas min! Estis vi, kara paĉjo, kiu sekvis min! Vi sekvis min al l' atiko! Sed ĉi-foje, mi trovis vin unua!"

Tiam, ŝi rapide alproksimiĝis al mi, kaj ŝi estis mordonta mian kolon! Mi kriegis!

Subite Kajla mem vekis min. Ŝi diris al mi: "Paĉjo, paĉjo, vekigu, vekigu! Vi terursonĝas."

Daŭre mi kuŝis sur la kanapo. Elektran energion reekhavis la domo. La televido ŝaltiĝis.

Mi diris al Kajla, ke mi dormetis kaj terursonĝis pri la vesperto.

Ŝi diris al mi: "Ne zorgu! Estis nur malbona sonĝo. La plagokontrolisto venos morgaŭ, kaj la vesperto baldaŭ foriros."

Tiam, ŝi forpaŝis kaj demone ekridetis.

Fino



Geedziĝdato de Júlia Sigmond kaj Sen Rodin

■ Sara Spanò



(Bildo aperinta en "L'Esperanto",
revuo de Itala Esperanto-Federacio, 2/2020, p. 22)

La 9-an de septembro (09.09) ne estas hazarda dato; des malpli estas tia la 9-a de septembro 2009, la geedziĝdato de Júlia Sigmond, ruman-hungara verkistino kaj pupaktorino, kaj de Sen Rodin (pseŭdonimo de Filippo Franceschi), itala verkisto.

Sen mencias la daton 09.09.2009 en la novelo "Sankta Maria", lastlinie, en la kolekto "Nu, kio do?"; Júlia mencias ĝin en sia rakonto "La skribistino", en la kolekto "90" (la sonregistraĵo daŭre aŭskulteblas ĉi tie: <https://mallonge.net/6i>).

Krome, ŝi mencias la geedziĝdaton kaj apartan festadsistemon en unu el la monataj leteroj kiujn ŝi

kutimis sendi al geamikoj, parolante pri "la mistera naŭa":

"Ni geedziĝis en metusalema aĝo, pro tio mi proponis al Filipo, ke ni ne festu la jardatrevenon, sed la monatan, ĉar ni geedziĝis la 9.9.9., nome la 9-an de septembro 2009 en Kluĵo. Pro tio, ni festas en ĉiu monato la 9-an tagon. Preskaŭ ĉiuj forgesis tiun tagon".

Tamen, ni certe ne forgesu pri tiu ĉi speciala tago kaj pri la geedza paro, falĉita en marto de la koronavirusa pandemio. Ilia deka geedziĝdatreveno, pasintjare, estis bedaŭrinde la lasta, kiun ili povis kunfesti.

Ni havis plurajn okazojn omaĝi al Júlia kaj Sen kaj memori pri ili dum la Monda Festivalo kaj la Virtuala Kongreso. Dum la Printempa Inaŭguro, la 20-an de septembro, eblos aŭskulti memorojn kaj anekdotojn pri la paro, ties amrilato kaj artilato, dum speciala, omaĝa momento dediĉita al ili.

Pliaj detaloj sekvos; intertempe, rezervu la daton, kaj pluinterkonatiĝu kun la verkoj de Júlia Sigmond kaj Sen Rodin!

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

<https://uea.org/alighoj/donacoj>



Forpasis Zlatko Tišljar (1945-2020)

Per sciigo de la samideano Josip Pleadin, UEA kun granda bedaŭro informas pri la forpaso de Zlatko Tišljar (1945-2020), inter esperantistoj konata kiel Pajo. Li estis unu el la multjaraj gvidantoj de la kroata Esperanto-movado, aktiva esperantisto ekde 1962 kaj laste proklamita Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio, en aŭgusto 2020. Pri lia impona biografio bonvolu legi la artikolon en Vikipedio: eo.m.wikipedia.org/wiki/Zlatko_Tišljar. Li forpasis la pasintan nokton en Zagrebo. Ni perdis grandan aktivulon. Ni strebu inspiriĝi de lia agado por nia estonteco kaj honorigi la ekzemplon, kiun li lasas al ni. UEA, nome de la tutmonda komunumo prezentas sian kondolencon al la familianoj kaj multaj geamikoj de Pajo.

